

BULGARA

10—1981

ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

*Ni lernas Esperanton.
Ni uzas la akuzativon.*





LETERO—ALVOKO

DE LA INFANOJ — PARTOPRENINTOJ EN LA
 ASEMBLEO „STANDARDO DE LA PACO“ AL ILIAJ
 AMIKOJ EN LA TUTA MONDO

Karaj amikoj,
 Junaj kreantoj,

Jam trian fojon ni, la infanoj el la tuta mondo, venintaj el 97 landoj de ĉiuj kontinentoj, kolektiĝis en gastama Sofio, la ĉefurbo de Popola Respubliko Bulgario, por amikiĝi en la nomo de unueco, kreado kaj beleco. Por tria fojo la sonorilejoj de la monumento „Standardo de la paco“ ĝoje sonoras en la unueca ĥoro de amikeco kaj paco. Por tria fojo ni kolektiĝas ĉi-tie, inspiritaj de la revo vivi en paco kaj krei laŭ la leĝoj de la beleco.

La Unua Asembleo „Standardo de la paco“, kiu okazis en 1979, en la Internacia jaro de la infanoj, kunvenigis la talentojn kaj la revojn de multaj infanoj el la tuta mondo. La forto de la unueco bruligis en niaj brustoj la flamon de l' inspiro. La mondo aŭdis nian vokon vivi kaj krei sub la flirtanta pac-standardo.

De jaro al jaro niaj vicoj densigas kaj plifortigas. Al la movado „Standardo de la paco“, al ĝia flugilhava devizo aliĝas ĉiam novaj junaj kreantoj — estontaj poetoj kaj verkistoj, pentristoj kaj artistoj, muzikistoj, teknikistoj kaj sportistoj. Ili aliĝas kun flamo en la okuloj kaj kuraĝo en la koro, transforminte la ideojn kaj la pasiajn revojn de la inspirita kreantino de la Asembleo „Standardo de la paco“ Ljudmila Jivkova en ridetojn, en flugon, en kreadon, en sian vivon. . .

(Sekvas sur p. 11)

NIAJ PERANTOJ

Britio, Covenham Louth, Lincs. LN11 0PF
 „Lavercroft“, Main Road, s-ro Paul Hewitt
 Jarabono 2.50 f. ster.

Ĉeĥoslovakio, Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, 110 00
 Praha 1 Jarabono: 5 u. s. dol. aŭ egalvaloro.

Ĉeĥoslovakio, 040 01 Košice, Šmerhova 35/1, Esperantisto Slovaka, Daniel P. Pak.

Danlando, Torsholmsvej 23, 9800 Hjørring
 s-ro J. H. Eriksen

Poŝtkonto 148 3951

Jarabono 37.98 kr.

Francio, F 54510 Tomblaine, B. P. 23,

s-ro Roger Degrelle

Ĝirkonto 771.77 R, NANCY

Jarabono 20. — f. f.

Finnlando, PL 221, SF 70 101, Kuopio 10,

Fiuna Esperanto-librejo

Jarabono 24 fmk.

Germana Demokratia Respubliko,

DDR 108 Berlin, Charlottenstr. 60,

Der Esperantist

Centra Labarrondo Esperanto

Germana Fed. Respubliko, Esperanto-eldonejo Palatina

Iggelbach, Schlossgasse 30, poŝtekkonto n-ro 1658
 48-678 ISHFN D-6731 Elmstein

Jarabono 8 gmk

Hispanio, Adonis Gonzalez Meana
 str. Marcelino González, 5-4º-doh.

Gijón (Asturias)

Jarabono: 300 pesetoj

Hungario, „Budapeŝta Informilo“, p.k. 153, H-1443 Budapest

Kubo, Ciego de Avila,

apartado 223, Pedro P. Lamas Diaz

Portugallio, Portugala Esperanto-Asocio, R. DR. Joao Couto, 6 R/C, A P — 1500 Lisboa

Jarabono: 260 esk.

Sovet-Unio, 200016 Tallinn, Estonio, do vostrebovanija
 Johannes Palu

Jarabono: 5 rubloj

Vjetnamio, Hanoi, 222 Dôc Càn,

Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio



NI DIGNE RESPONDU AL LA NOVAJ TASKOJ DE ESPERANTO-INSTRUADO

KUNČO VALEV.

Ĝenerala sekretario de BEA

Kun granda gojo kaj profunda kontento la bulgaraj esperantistoj renkontis la decidon de la Ministerio de Popola Klerigado pri enkonduko de Esperanto kiel fakultativa lernobjekto en 9-a klaso de la mezaj politeknikaj lernejoj, en I kurso de la fakaj mezlernejoj („teknikumoj“) kaj de la mezaj profesiaj faklernejoj. Esperanto jam estas enskribita kiel lernobjekto en la instruprogramo por 1981/1982, kiun la Ministerio sendis al ĉiu lernejo.

La enkonduko de Esperanto en la lernejoj estas grava akiraĵo ne nur por la bulgara E-movado, sed ankaŭ por la tuta instru-eduka sistemo en nia lando. La instruado de Esperanto ludos pozitivan rolon en la klerigado kaj edukado de la juna generacio — ja neniu alian fremdan lingvon la lernantoj povus elteni en tiom mallonga tempo kaj apliki ĝin por praktikaj celoj, kiel la Internacia lingvo Esperanto. Post nur kelkaj monatoj da diligenta lernado de Esperanto, oni povas komenci korespondadon kun alilandaj esperantistoj, interŝanĝadon de libroj, gazetoj, ĵurnaloj, prospektaj, bildkartoj, pupoj en naciaj kostumoj ktp. Krome, la bona posedo de Esperanto permesas realigon de ekskursoj, reciprokaj vizitoj kaj gastadoj ĉe korespondamikoj en eksterlando. Ĉio ĉi sendube vastigos la konojn de la ĝejnuloj pri proksimaj kaj malproksimaj landoj kaj popoloj, konigos al ili laŭ plej natura maniero la geografia, etnografia, historio, soci-politika vivo, kulturo, literaturo kaj arto, la nuntempajn vivkondiĉojn en tiuj ĉi landoj, la revojn kaj strebojn de la popoloj ilin loĝantaj. Per Espe-

ranto nia junularo dank' al sia persona sperto lernos esti la ceterajn popolojn kaj taksos kulturajn valorojn, pasos praktikan kuron de pacamo, humanismo kaj internaciismo.

Samtempe per Esperanto nia junularo pli aktive kaj tute konkrete plenumos sian devon al la Patrolando: en leteroj al amikoj el eksterlando la ĝejnuloj rakontos pri ĉio bona kaj pozitiva, kiun nia popolo kreis dum la jarcentoj, pri ĝiaj heroaj bataloj por nacia sendependeco, libereco kaj socia justeco, pri la nova vivo en nia patrujo, pri niaj florantaj ekonomio, kulturo kaj arto. Kun aparta amo nia lernantaro rakontos pri la historiaj kaj kulturaj monumentoj de nia lando, pri la belaj, per kiuj la naturo tiel malvarme ĝin dotis. Tiel nia patrujo akiros novajn amikojn, kaj tio signifas — novajn amikojn de la paco kaj la socialismo. En tiu praktika laboro kreskos kaj firmigos la patriotisma sento de la juna generacio.

La lernado de E-o — lingvo logika kaj preciza, kun racia, simpligita gramatiko, sen malregulaĵoj kaj esceptoj — helpas la lernantojn pli aktive kaj bonrezulte asimili la aliajn fremdajn lingvojn.

Samtempe E-o havigos tute rektan uŝlon al la instruistaj kolektivoj mem, al al gvidantaroj de la lernejoj. Estante facile lernebla de ĉiu homo, ĝi disponigas bonegajn eblojn por aktivaj senperaj kontaktoj kaj interŝanĝo de sperto en la instrulaboro. Kaj tio estas interesa kaj grava por ĉiu pedagogo, por ĉiu lernejestro.



Ĉio ĉi devigas nin, la bulgarajn e-istojn, alpaŝi kun sento de plej alta respondeco al la taskoj de la fakultativa instruado de E-o en la lernejoj. Al la decido de la Ministerio de Popola Klerigado ni devas respondi per konkretaj agoj. Ĉie, kie ni jam havas bone preparitajn instruantojn de E-o, ni devas fari paŝojn al enkonduko de tia instruado. Ĉerte nenie la instruado de E-o komenciĝos sen la iniciato kaj helpo de la e-istoj. Ĉi tie la parolon unufoje havas la estraroj de niaj E-societoj kaj niaj distriktaj estraroj.

Sed nenie oni devas agi tiel, ke anstataŭ utilo ni ricevu malutilon. En lernejoj E-o devas esti instruata nur de diplomitaj E-instruistoj (laŭ la regularo de la Ministerio de Popola Klerigado). Kiel escepto nun, en la komenco, E-on povus instrui ankaŭ malnovaj, jam elprovitaj kursgvidantoj, kiuj per sia ĝisnuna laboro pruvis, ke ili havas la necesan lingvan kaj metodikan nivelon kaj samtempe ĝuas la necesan moralan aŭtoritaton en sia loĝloko. Ĉe la nuna manko de bonaj E-instruistoj oni devas utiligi ankaŭ tiujn, kiuj sukcese faris la ekzamenon por la III grado kaj ricevis ĝeneralan pritakson almenaŭ bonan (plena 4). Tiaj triagradanoj, kompreneble, devas prepari sin kaj baldaŭ fari ankaŭ la ekzamenon pri melodiko de E-instruado (post nepra parolpreno en la speciala metodika grupo). Neniel en lernejoj oni devas permesi instruadon de E-o fare de personoj, kiuj ankoraŭ ne estas pretaj aŭ ne havas la necesan por pedagogo aŭtoritaton. Tio povas grave kompromiti nin kaj por longa tempo fermi por ni la pordon de iu lernejo aŭ distrikta direkcio de „Popola Klerigado“. Povus okazi,

ke iuloke oni alpaŝas al tiu grava tasko spontane, neorganizite, kun multa entuziasmo kaj bonaj intencoj, sed sen la necesaj objektivaj kondiĉoj por certa sukceso. Necesas kontrolo de la distriktaj estraroj kaj de la Centra Estraro de BEA. Multe pli bone estas komenci instruadon en malpli da lernejoj, sed ĉe anticipe certaj kondiĉoj por sukceso, ol ekagi en granda nombro da lernejoj kun nekonvenaj instruantoj. Tio kompromitos la gravegan aferon.

Kune kun la Ministerio kaj la distriktaj direkciaj „Popola Klerigado“ ni devas komenci preparadon de estontaj E-instruistoj. Jam nun niaj E-societoj devas ĉiuloke organizi kursojn por profesiaj instruistoj, kaj kie tio ne estas ebla, ili devas direkti la instruistojn al la civitanaj kursoj kaj ankaŭ al la Centra Korespondanta E-Kurso en Sofio. Se en iu distrikto kolektiĝos almenaŭ 15 instruistoj por la korespondanta kurso, ili povus formi apartan distrikthan kurson, kiu regule ĉiumonate povus havi ĉeestajn okupojn (sabate kaj dimanĉe) en difinita loko en la distrikto mem sub la gvidado de loka aŭ ekstera lekoro. Dum la vintraj kaj printempaj ferioj de la instruistoj funkcios centraj unusemajnaj ĉeestaj kursoj, kaj somere — 20-tagaj internaciaj kursoj por instruantoj de E-o. Ĉiujn ĉi kursojn oni nepre devas rekomendi al la instruistoj. BEA kaj ĝia Instruista Sekcio kune kun la Ministerio de Popola Klerigado ellaboros kompletan sistemon por preparado de E-pedagogoj.

Al obstina, organizita kaj sindona laboro por plenumo de la novaj gravaj taskoj, starantaj antaŭ nia movado sur la kampo de la instruado, al plua disvastigo kaj antaŭenigo de E-o en nia lando.

KOMUNIKO DE LA BULGARA MEM-KOMITATO

La kampanjo por kolektado de subskriboj responde al la Alvoko de CE de BEA kaj de la Bulgara MEM-Komitato subtene al la Alvoko de la Kvakera Esperantista Societo pri abolicio de la nukleaj armiloj kaj de ĉiuj armiloj por amasdetruo kaj pri ĝenerala kaj kompleta malarmado daŭras plu. La nombro de la kolektitaj subskriboj atingis la ciferon 4044. Subskriboj estas kolektitaj de 25 E-societoj.

Daŭrigu la kolektadon de subskriboj, ne perdante tempon!

LA RAPORT-ELEKTA KAMPANJO — RESPONDECA PERIODO EN LA ESPERANTISTA AGADO

La raport-elekta kampanjo estas respondeca periodo en la vivo de la E-societoj kaj organizaĵoj. Laŭ decido de la Buroo de la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio ĝi komenciĝas je la 15-a de novembro 1981 kaj finiĝos je la 20-a de marto 1982. La raport-elektaĵoj okazos de la 15-a de novembro 1981 ĝis la 20-a de januaro 1982 kaj la raport-elektaĵoj konferencoj — de la 20-a de januaro ĝis la 20-a de marto 1982.

Dum la raport-elekta kampanjo la societoj kaj la organizaĵoj analizos la ĝisnunan laboron, faros decidojn pri sia estonta agado kaj elektos novajn gvidorganojn.

Estus bone, se la societaĵoj akceptus planojn, inkluzivantajn prilaboron de la materialoj, teknikan prizorgon, laboriniciaĵojn ktp. Fiksinte la datojn de la kunvenoj, la distriktaĵoj estraroj devas prepari datliston de la distrikta E-organizaĵo kun respondeculoj — membroj de la Buroo. Lige kun la organiza kaj teknika preparado de la kunvenoj kaj konferencoj, la societaĵoj kaj distriktaĵoj estraroj devas ellabori apartajn planojn.

Post la raport-elektaĵoj kunvenoj la societaĵoj kaj distriktaĵoj estraroj devas senprokrastesendi la raporton, la decidojn, la protokolon kaj la liston de la novelektita societa aŭ distrikta estraro kun ĝustaj adresoj al la kancelario de CE de BEA por administraj bezonoj.

Grava tasko post la kunvenoj kaj konferencoj devas esti la instruado de la aktivularo per organizo de distriktaĵoj aŭ regionaj seminarioj (plej konvene, verŝajne, per unuigo de la fortoj de du aŭ pli da distriktaĵoj estraroj).

Dum la raport-elekta kampanjo la societaĵoj kaj la distriktaĵoj estraroj devas atenti pri iuj problemoj, kies solvo garantios bonan nivelon. Inter ili en la unua vico estas la preparo de la raportoj. Ili devas analizi, sed ne kronologie. En ili oni devas vidi la sukcesojn, pritaksi la laboron de la societaĵoj kaj distriktaĵoj estraroj, serĉi la kialojn de la preterlasoj kaj montri la ĝustan vojon al ilia forigo. Samtempe la kontrolaj komisionoj devas prepari siajn raportojn, traktante krom financajn problemojn ankaŭ la regulan laboron de la estraro, la staton de la arkivo ktp.

Gravan signifon pri la estonta agado de la societoj kaj organizaĵoj havas la akceptitaj decidoj. Ili devas esti realigeblaj kaj devas montri la ĝeneralan linion pri la evoluo de la koncerna organiza unuo. Dum tiu ĉi raport-elekta kampanjo la konferencoj ne ak-

ceptos rezoluciojn, sed kompleksajn programojn de la distriktaĵoj estraroj — simile al la kompleksa programo de CE de BEA. Ili enhavos la celojn, direktivojn, la fundamentajn taskojn de la distriktaĵoj E-organizaĵoj kaj la aranĝojn, celantajn efektiviigi ilin.

Specialan atenton meritas la eldiroj, kiujn oni ofte subtaksas. Por ke la kunvenoj kaj konferencoj transformiĝu en krea diskutado de la pasinta kaj estonta agado, la distriktaĵoj kaj la societaĵoj estraroj povus interkonsenti kun apartaj esperantistoj pri eldiroj rilate konkretajn problemojn. Tiamaniere oni evitos la ripeton de samaj temoj kaj garantios seriozan traktadon.

Unu el la plej gravaj taskoj, kiu devas esti en la centro de l' atento de la distriktaĵoj kaj societaĵoj estraroj, estas tiu pri la estraroj mem. De ilia konvena elekto dependas la estonta aktiveco de la E-societoj kaj organizaĵoj. Ĉe elekto de la novaj gvidorganoj oni kutime zorgas pri kelkaj principoj. Kiel anojn de la societaĵoj kaj distriktaĵoj estraroj oni devas altiri iniciatemajn kaj energiajn aktivulojn, montrantajn daŭran intereson al la E-movado. Dum tiu ĉi raport-elekta kampanjo estas necese eviti la elekton de iuj aktivuloj kaj en la societaĵoj kaj en la distriktaĵoj estraroj. Ilia trookupateco ne permesos al ili profundigi sian agadon. Samtempe oni devas labori pri altiro de junaj e-istoj al la distriktaĵoj kaj societaĵoj estraroj — principo, ligita kun la zorgo pri la kontinueco de la kadroj. En la estraroj oni devas elekti kaj junajn kaj pli aĝajn esperantistojn, kiuj transdonu sian sperton al la juna generacio. Preferinde estas serĉi e-istojn, kiuj havas certan organizaĵan sperton. Ĉe la pridiskuto de la projekto-listoj oni ĉiam devas konsideri la dezirojn kaj kapablojn de la koncerna persono. Tiamaniere ĉiu estos maksimume utila.

Krom tiuj fundamentaj problemoj la raport-elekta kampanjo inkluzivas multajn aliajn, ligitajn kun la organiz-teknika preparo de la kunvenoj kaj konferencoj kaj de la koncernaj materialoj. Ilia ĝusta solvo garantios la sukceson. Imitinda ekzemplo estas la pasintjara raport-elekta kampanjo, kiu pasis altnivele kaj dum kiu la nunaj aktivuloj de la societaĵoj kaj distriktaĵoj estraroj montris senton pri respondeco kaj altan konscion.

DIMITAR PAPAŴOV,
sekretario de BEA

66a UNIVERSALA KONGRESO EN BRAZILIO TRA LA RIGARDO DE BULGAROJ



La 24an de julio ĉi-jare ni forveturis okcidenten — al FRG. En la moderna flughaveno de Frankfurto, unu el la plej grandaj en Eŭropo, la grandega kvarmotora transoceana aviadilo „Boeing-747 „englutis“ preskaŭ 400 personojn. Estis noktomezo, kiam ni ekflugis al Rio de Janeiro. Dek unu horojn kaj 45 minutojn senhalte ni estis en la spaco je alteco de pli ol 13 mil metroj super la mar-nivelo. La komforta kaj trankvila flugado iom post iom dormigis la pasaĝerojn. Jam mateniĝis, kiam oni anoncis, ke ni proksimiĝas al Rio de Janeiro. La urbeo ankoraŭ dronis en nokta vualo kaj estis malbone videbla, sed ĝiaj tremetantaj lumoj speguligis en la oceana surfaco kaj la vidaĵo estis preskaŭ fantazia! . . .

... Unuaj paŝoj sur brazila tero, unuaj kontaktoj kun brazilanoj! Ĉio estis nova, nekonata al ni. La restado en Rio estis tute mallonga: ni denove ŝanĝis la aviadilon kaj nun nia celo estis Brazilio — la nova ĉefurbo de Brazilo, la ĉefurbo de la 66a Universala Kongreso de Esperanto. Por la eŭropano ĉio en tiu plej granda en Latin-Ameriko lando estas nekonata: la ebenaĵoj, la klimato, la naturo, la diverskolora haŭto de la loĝantaro, la moroj, la konstruaĵoj kaj ilia arkitekturo. . . Ni eniris tute novan por ni mondon, kiu vere ravis nin de la unua rigardo. Brazilio — la nova ĉefurbo de la lando, estas konstruita nur antaŭ 21 jaroj sur neloĝataj ebenaĵoj. La tiama registaro, gvidata de Juscelino Kubitschek, komisiis al la mondfamaj arkitektoj Oscar Niemeyer kaj Lucio Costa realigi siajn kuragajn kaj neordinarajn ideojn pri la konstruado de la ĉefurbo. La konstruaĵoj de la Nacia Parlamento, de la Nacia Teatro, de diversaj ministerioj, la preĝejoj kaj la sportaj kompleksoj estas unuigitaj en unu tuton, situitan sur du interkruciĝantaj vojoksoj. La krea fantazio de Niemeyer kaj Costa manifestas kaj prezentas sin en la rimarkindaj, belegaj kaj eksterordinaraj laŭ siaj formoj kaj situo konstruaĵoj el ŝtalo kaj betono, aluminio kaj vitro. Forte impresas la mirinde bela sidejo de la Ministerio de Eksteraj Aferoj — la palaco Itamaraty, kaj la rezidejo de la prezidento — la Palaco de la Tagiĝo — Alvorada. La ideo pri la emblemo de la 66a UK de Esperanto estas kreita simile al la formoj de Alvorada. Brazilio estas unika en la mondo kreaĵo de aŭdacaj kaj talentaj fantaziuloj.

Al la 66a UK de Esperanto aliĝis 1749 geesperantistoj el 49 landoj de ĉiuj kontinentoj. La intereso al la kongreso en la lando mem estis ekskluzive granda — pli ol la duono de la kongresanoj estis brazilanoj. Pli ol 100 e-istoj venis el najbara Argentino. Alvenis grupoj el Ĉilio, Kolombio, Peruo, Urugvajo kaj Venecuelo. Kvazaŭ la tuta Latin-Ameriko renkontiĝis en Brazilio, unuigita de unu komuna lingvo. . . Al la sudamerikaj delegitaroj aliĝis esperantistoj el multaj eŭropaj landoj, el Ĉinio kaj Japanio. Eble pro tio la belga ambasadoro en Brazilio en sia salutparolo nomis Brazilion „Ĉefurbo de la espero“! . . .

La oficiala inaŭguro de la kongreso okazis en la Parlamento. La 26an de julio, iom antaŭ la 10a horo, la esperantista publiko kaj la oficialaj gastoj — diplomatoj kaj parlamentanoj, kaj civitanoj de la ĉefurbo, inundis la placon antaŭ la pitoreska konstruaĵo. En la brile blua ĉielo aperis aviadiloj, el kiuj eksaltis paraŝutistoj kun flirantaj E-flagoj. Solena kaj majesta vidaĵo! . . .

La luksa rondforma Cambro de deputitoj jam estis plenplena de kongresanoj kaj gastoj. Post la tradicia malferma salutparolo de la Prezidanto de UEA s-ro Gr goire Maertens, antaŭ la tribuno ekstaris la Viceprezidanto de Brazilo d-ro Aureliano Chaves, kiu salutis la partoprenantojn en la nomo de la Alta protektanto de la 66a UK — la Prezidanto de Brazilo Joao Baptista de Oliveira Figueiredo. D-ro Chaves alte taksis la rolon de Esperanto por firmigo de la monda paco kaj por la interkompreniĝo de la popoloj en ilia pacama kunlaborado. Li speciale substrekis, ke Brazilo larĝe malfermas siajn pordojn por la lingvo de la amikeco kaj vigne subtenas ĉiujn tiudirektajn agojn de UEA, celantajn la evoluon de la E-movado en la mondo kaj speciale en Latin-Ameriko.

Nova agrabla ero de la solena inaŭguro estis la renovigo de la tradicio de UK en Sofio, Varna kaj Lucerno — emisii specialan kongresan poŝtmarkon. D-ro Tonkin tralegis la mesaĝon de la Ĝenerala Direktoro de UNESKO s-ro Amadou Mahtar M'Bow, kiu arde apogas la ĉefan temon de la UK „Kulturoj kaj lingvoj: pontoj kaj baroj“, pri kiu belege parolis ĉe la solena inaŭguro la Prezidanto de la E-Akademio s-ro William Auld. Dum la kongresa semajno specialajn kontribuojn pri la menciita temo faris Sylla Chaves (Brazilo), Humphrey Tonkin (Usono) kaj Baldur Ragnarsson (Islando).

La interkona vespero ĉi-foje ne okazis laŭ la malnova tradicio — kun dancoj. En la grandega halo oni promenadis kaj babilis, regaladis sin per kafe kaj minerala akvo, kiujn oni disponigis al la kongresanoj senpage dum la kongresaj tagoj. La Brazilia Vespere, okazinta en la Nacia Teatro, estis vere brila: la danc- kaj kantensemblaj el la regionoj de Sao Paulo, Rio Grande do Sul (gaŭĉa grupo) kaj Alagoas frenezigis la publikon per siaj temperamentaj ritmoj kaj pasiaj kantoj majstre plenumitaj.

La sekvantajn tagojn la anoj de nia bulgara grupo disigis. Ĉiu partoprenis diversajn kongresajn aranĝojn laŭ sia prefero kaj intereso.

PETAR TODOROV — Viceprezidanto de BEA kaj Estrarano de UEA pri faka agado:

— En sia laboro la Komitato de UEA kaj la diversaj komisionoj traktis multajn gravajn problemojn pri la plua evoluo de la monda E-movado. La Estraro plustabiligas la eksterajn rilatojn kun UNO, UNESKO, la Organizaĵo de la afrikaj landoj k.a.; plu laboros por altiro al UEA de specialigitaj kaj fakaj E-asocioj, por plimultigo de la membraro de UEA kaj por plua stabiligo de ties financa stato. Estis esprimitaj deziroj kaj espero, ke la fakaj organizoj de ĵurnalistoj, muzikistoj, kino-foto-amatoroj, artistoj kaj aliaj aktive helpas kaj partoprenos en diversaj programoj de UK: muzikaj kaj artaj vesperoj, IGS, ekspozicioj, ktp. Gravan rolon por la popularigo de E-o oni komisiis al la Budapeŝta E-Centro kaj al ĝia nov-elektita gvidanto prof. Ottó Haszpra el la Budapeŝta Politekniko. Serioza problemo diskutita dum la kunsidoj de la komitato estis la solena celebrado de la 100-jariĝo de la E-movado kaj la elekto de la lando, en kiu ĝi okazos. Kvankam niaj sovetaj amikoj iom malfruis — ili alvenis Brazilon en la du antaŭlastaj tagoj, ni sukcesis starigi kontaktojn kaj agi kune kaj laŭcele. La lastaj kunsidoj de la Komitato de UEA okazis en Bona Espero — la fama E-kolonio de familio Grattapaglia, situanta 230 km nordoriente de la ĉefurbo Brazilio — en vera savano. Ĉe favoraj vivkondiĉoj tie oni instruas 30 infanojn en E-o kaj tiamaniere kreas veran esperantan familion.

La naturo kaj la klimato de Brazilo estas belegaj, sed la plej granda trezoro de tiu fora lando estas ĝia simpatia, laborema kaj gastama popolo.

VASJA PETROVA — Internacia E-Kursejo, Sofio: — Rakonti pri Brazilo kaj pri nia partopreno en la 66a UK de E-o en kelkaj linioj estas tute neeble. Mi ŝatus mencii nur kelkajn okazintaĵojn, kiuj profunde impresis kaj emociigis min. Tutkompreneble, mi partoprenis (kune kun miaj samlandanoj Maria Taŝeva, Ekaterina Maneva kaj Lilia Sotirova el Plovdiv) la aranĝojn de la Virina E-Agado, grupigitajn en tri kunvenoj. Estis elektita varia programo de diskutotaj temoj, rilatantaj la rolon de la virinoj

en la soci-politika vivo kaj la kulturo, la pozicio de la virino en la moderna familio, la egalrajteco de la virinoj k. a. Nia partopreno en la kunsidoj kaj diskutoj permesis al ni starigi multajn kontaktojn kun e-inoj el diversaj landoj de la mondo.

En la nomo de la Virina komisiono de BEA mi tra-legis salutleteron al la partoprenintoj en la kunveno de KVA kaj koncize informis ilin pri la agado de la bulgaraj esperantistinoj.

Emociiga por mi estis la recito de versaĵoj de nia E-poeto Hristo Gorov, kiu estis speciale invitita partopreni la Renkontiĝon de E-poetoj dum la kongreso. Tiun ĉi taskon li komisiis al mi. Vi eble povus imagi kiom da emocioj provokis ĉe mi la deklamo de du verkoj de k-do Gorov — „Patrino atendas“ kaj „Septembra balado“! . . .

Mia partopreno en la Varia distra vespero de la kongreso estis nova elprovo por mi. La poemo „Nedisigeblaj“ de Penĉo Slavejkov kaptis la atenton de la ĉeestantoj, kiuj rekompensis min per siaj korvarmaj aplaŭdoj. Ilia sincera rido renkontis miajn E-humoraĵojn. . . Pri kio mi ankoraŭ rakontu? Ĉu pri la brazila vespero en la „Klubo de Golfo“, kie ni gustumis diversajn specialaĵojn de la brazila kuirarto kaj senlace dancis sub la akompano de „samba-orkestro“? Ĉu pri la ekskurso al urbo Cristalina?

Mi estis unu el la „feliĉulinoj“, kiuj havis la eblecon post la fermo de la kongreso veturi tra la lando — speciale al la plej granda urbo de Brazilo — Sao Paulo, kun pli ol 12-milona loĝantaro, tipe industria, financa kaj komerca metropolo, sed ankaŭ universitata kaj kulturklera centro. Post trarigardo de la vidindaĵoj de Sao Paulo kaj la vizito ĉe amika familio en urbo Campinas min atendis novaj emociaj travivaĵoj en Rio de Janeiro — la fincelo de nia veturo. Ĉu mi povus aldoni ion novan al ĉio jam skribita kaj dirita pri tiu urbo-fantazio — la plej bela en la mondo? Oni devas supreniri la monton Corcovado, sur kiu staras grandega statuo de Jesuo kun etendi



La konstruaĵo de la Nacia Parlamento

faj braloj, kvazaŭ por „brakumi“ la tutan panoramon de la urbego. De tie la vidaĵo de Rio estas vere fabelal. La mondfama strando „Copacabana“ etendiĝas laŭlonge de la golfo, en kies sino kuŝas la perlo de Suda Ameriko. Kaj najbare kun la beleco de la naturo kaj la mirindaj konstruaĵoj — en la periferiaj kvartaloj de Rio loĝas la malriĉeco samkiel en Sao Paulo... Du socialaj flankoj de nuntempa Brazilo.

NIKOLA BOJILOV — fotisto:

— Vi venas el Bulgario? Ho, sinjoro, ni petegas vin, rakontu al ni pri via lando!

Cirkaŭite de miaj novaj konatuloj el Brazilo, mi rakontadis kaj rakontadis pri mia belega patrujo — la lando de la rozoj, la lando konstruanta novan socialisman socion, la lando de monde fama revoluciulo Georgi Dimitrov — arda batalanto kontraŭ la faŝismo, heroo de la Lajpciga faŝista juĝ-proceso. . .

Mi tute ne povis imagi, ke brazilaj e-istoj tiel vikle ekinteresiĝos pri mia persono kaj pri mia lando! Cu tio estis nur gesto de gastamo, de gentileco? Ho, nel ili tion pruvis per siaj donacoj, per la deziro ŝanĝi adresojn, per sia invito ke mi partoprenu interesan ekskurson kune kun ili. . .


Pri la kongresaj tagoj miaj samlandanoj jam detale rakontis. Mi povus nur aldoni, ke mia pasio de fotisto ne lasis min trankvila kaj mi dum la tuta tempo faris fotojn. Bedaŭrinde, mi ne disponis pri altkvalita foto-materiale kaj pro tio miaj fotoj ne superas la amatorecon. Tamen miaj „verkoj“ estas mia „bilda rakonto“ pri la kongresaj aranĝoj, pri

niaj renkontigoj kun alilandaj e-istoj. Se mi povus fanfaroni pri io, tio ja certe estas la fakto, ke mi estis la sola bulgaro inter la amaso da brazilanoj kaj eksterlandaj kongresanoj, kiu partoprenis ekskluzive interesan ekskurson al akvofalo Itikira trapasante la malnovan urbeton Planantila, ĉirkaŭitan de fontoj, kiuj donas la komencon de la rivero Paranoa, fluanta al la ĉefurbo Brazilio. Ni estis en la brazila ĝangalo! La akvofalo Itikira („Fianĉina vualo“) kolektas amason da akvo de la rivero Paranoa kaj de apudaj riveretoj kaj sin jetas en la abismon de alteco de 170 metroj, kovrante grandan parton de la ĉirkaŭaĵo per akva polvo, disŝanta je multaj pli malaltaj akvofaloj, kiuj kvietigas en helaj okuloj de lagetoj. . . Cie en la ĉirkaŭaĵo estis multaj daktilpalmoj, elsub kies kronoj pendis tuboj da daktiloj. Neniu rikoltadis ilin kaj ni ankaŭ ne havis tempon por simila peno. . .

Jen nia mirinda veturo al la transatlantika kontinento de Latin-Ameriko jam estas nur rememoro, kiun ni neniam forgesos ne nur pro ĝia neripetebla originaleco, sed ankaŭ pro la profundaj emocioj, kiujn ĝi provokis en niaj koroj, pro la gastamo de la bonkora brazila popolo, akceptinta nin kiel gefratojn el la lando de la rozoj, el amika esperantista Bulgario.

**Brazilio — Sofio,
julio-aŭgusto 1981**

**PETĀR TODOROV
VASJA PETROVA
NIKOLA BOJILOV**



La prezidenta palaco Alvorada

AL K-DO BORIS KAVALĜIEV

RUSE



Estimata k-do Kavalĝiev,

La Centra Estraro de BEA plej kore salutas Vin okaze de Via 80-jariĝo kaj deziras al Vi sanon, vignecon kaj longan vivon.

Vi fordonis pli ol 60 jaroj de Via vivo kiel organizanto kaj propagandisto de la bulgara E-movado.

Tiu ĉi Via agado estis ege fruktozona. Dank' al Via konvinkoplena argumentado por Esperanto, por la utila patriota, internacia kaj kultura agado de la bulgaraj esperantistoj, en niajn vicojn venis centoj da novaj E-aktivuloj.

Ni bondeziras al Vi longan vivon, por ke Vi plu laboru same tiel sindone por la prospero de Esperanto, por la prospero de nia socialisma patrolando, en defendo de la paco kaj la internacia amikeco!

Sofio, aŭgusto 1981

CE de BEA

Veterano Boris Kavalĝiev el Ruse jubileas. La 22-an de aŭgusto li atingis la aĝon de 80 jaroj. Lia esperantista aktivado superas 60 jarojn. Ni ĉiuj bone konas lin. Preskaŭ ne ekzistas enlanda esperantista aranĝo, en kiu li ne partoprenis. Ofte, tre ofte li recitas proprajn esperantajn poeziaĵojn.

Li esperantigis ĉe tute nekutimaj kondiĉoj — en la polica arestejo. Kiel junulo li estis fervojisto en la Balkanmontara stacio Plaĉkovci kaj vigle partoprenis la klasbatalojn de la profesiaj unuigoj. En decembro 1919 komenciĝis la fama fervojista striko kaj li per sia tuta junula ardo partoprenis ĝin. Sekvis arestoj kaj persekutoj kontraŭ la strikantoj. La policaj arestejoj ne sufiĉis kaj la registaro uzis la kazernojn.

En la arestejo de la kazerno en Sevlievo en februaro 1920 Boris Kavalĝiev lernis la Internacian Lingvon, instruatan de la esperantisto-fervojisto Bogomil Radoslavov de fervojstacio Gorna Orjahovica laŭ la fama Esperanto-ŝlosilo Ĉefeĉ. La lingvo entute kaptis la junulon, jam scipovantan la rusan, la francan kaj la germanan kaj li restis fidela al ĝi por ĉiam. Post sia eliro el la malliberejo li komencis praktiki la lingvon, korespondante kun eksterlandaj esperantistoj, legante gazetojn kaj librojn. En la vintro de 1922 li ofidis en fervojstacio Kaspican, kie organizis por kolegoj sian unuan Esperanto-kurson. En la somero de la sama jaro oni eksigis lin de la fervojista profesio pro la iama partopreno en la striko. Boris Kavalĝiev veturis urbon Veliko Tŕrnovo, kie gvidis vesperajn kursojn por kontistoj ĉe la loka komerca gimnazio. Ankaŭ en tiu urbo li aktivis por Esperanto en la vicoj de la loka socio „Lumo“, sed plej grandan sian sukceson tiaman li opinias la esperantigon de sia samklasano Vasil Siŝkov, kiu en 1924 elmigris Francion kaj dum multaj jaroj redaktis

esperantan revuon en Parizo.

Pli malfrue li trovis oficejon en la apudnuba vilaĝo Rjahovo, distrikto de Ruse. De tie li veturis al la Xa kongreso de la bulgaraj esperantistoj en Veliko Tŕrnovo. Tio estis lia unua partopreno en Esperanto-kongreso. De Ruse ĝis la kongresa urbo li veturis en la kompanio de la rumanj gastoj al la kongreso — pastro Andreo Ĉe, Henriko Fiŝer, Tiberio Murario. La kontaktoj kun tiuj eminentuloj lasis al li neelviŝeblan memoron.

En vilaĝo Rjahovo Boris Kavalĝiev ekgvidis E-kursojn, vizitatajn precipe de junuloj. Lia abunda eksterlanda korespondado forte impresis la vilaĝanojn kaj la intereso al Esperanto alte kreskis. Sed venis la faŝistaj teruraĵoj post la frakaso de la Septembra kontraŭfaŝista ribelo en 1923. La ondoj de Danubo trenis tage kaj nokte kadavrojn de mortigitaj ribeluloj. Policanoj kaj faŝistaj murdistoj invadis la vilaĝojn kaj terurigis la loĝantaron. Policanoj kondukis Boris Kavalĝiev en la komunuman oficejon kaj antaŭ la vilaĝestro severe ordonis al li tujan ĉesigon de lia esperanta agado, ĉar Esperanto estas komunista lingvo. Okaze de malobeo — sekvos mortigo. Tio kaŭzis longan paŭzon en lia poresperanta agado.

Kiam la politika firmamento piliĝis Boris Kavalĝiev denove ekagis. Sed lia plena fardo al Esperanto venis kun la popola venko kontraŭ la faŝismo je la 9-a de septembro 1944. Longajn jarojn li estis membro de l' estraro de la loka E-societo „Libero“ en Ruse, propagandis, gvidis kursojn.

Liaj poeziaĵoj aperas en kelkaj landaj kaj eksterlandaj esperantistaj periodaĵoj.

Ni tutkore salutas la veteranon okaze de lia 80-jariĝo kaj varme bondeziras al li sanon kaj prosperon.

KR. KARUCIN

NOVAJ TASKOJ ANTAŬ LA E-PEDAGOGOJ

La 13-an kaj 14-an de septembro j. k. en Sofio okazis la Unua Nacia Metodika E-konferenco. Ĝia celo estis pridiskuti la organizajn kaj metodikajn demandojn, aperintajn post la decido de la Ministerio de Popola Klerigado pri fakultativa lernado de Esperanto en la 9-a klaso de la gimnazioj kaj en la 1-a kurso de la mezaj faklernejoj. Ĝi estis organizita de la Instruista Sekcio de BEA kaj la Ministerio.

La konferencon prezidis k-do Bozarov, reprezentanto de la Ministerio, vicdirektoro de la Instituto por perfektigo de instruistoj kaj prezidanto de la Instruista Sekcio de BEA. Prelegis k-do Kunco Valev, ĝenerala sekretario de BEA, rektoro de la Someraj Internaciaj Kursoj por E-instruistoj kaj honorariata lektoro de Esperanto en la Sofia Universitato.

Per kelkaj enkondukaj vortoj li menciis, ke tiu neordinara evento efektiviĝas en jaro riĉa je jubileoj por niaj lando kaj popolo.

K-do Valev parolis detale pri la celoj de instruado de E-o en la lernejoj. La unua celo estas instrui. Je la fino de la unua lernojaro, se ne la plimulto, almenaŭ la plej bonaj lernantoj devas povi fari elementan konversacion kaj legi E-literaturon. Oni devas ankaŭ komenci viglan korespondadon. Per ĝi oni aranĝu ekspoziciojn en la lernejoj por propagandi inter la ceteraj lernantoj kaj instruistoj la altajn kvalitojn de E-o kaj la atingojn per E-o. Kaj samtempe al eksterlandaj lernantoj oni rakontu pri niaj ĉiufankaj sukcesoj.

Per tiu ĉi laboro ni atingu la duan celon de la E-instruado — la edukon. Ni zorgu, ke niaj junaj adeptoj estiĝu konvinkitaj batalantoj por paco kaj amikeco inter la popoloj, veraj patriotoj kaj internaciistoj samtempe. Ili devas nepre konvinkiĝi, ke E-o estas neŭtrala lingvo rilate al nacio, raso, religio kaj kulturo; ke ĝi estas ne nur lingvo, sed

ankaŭ movado humana kaj demokratia, kontraŭa al ŝovinismo, rasismo kaj militarismo.

La dua punkto, pri kiu k-do Valev tre longe parolis, estas la metodiko de la E-instruado. Li faris mallongan historian promenadon por menciigi la diversajn metodojn, laŭ kiuj oni instruis en la pasinteco fremdajn lingvojn. Detale li parolis pri la konata „rekta metodo“ de Andreo Ĉe, pri ĝiaj bazaj principoj kaj postuloj. Fine li rekomendis KA-metodon, kiu estas modernigita Ĉe-metodo.

Poste k-do Valev detale parolis pri la instruado de fonetiko, leksiko kaj gramatiko, pri instruprogramo, instruplanoj, specoj de instrulaboro, eksterklasa laboro de la lernantoj ktp.

La komenco de la dua tago estis dediĉita al demandoj, eldiroj kaj interŝanĝo de spertoj inter la ĉeestantaj instruistoj.

Sekvis modela leciono, kiu ankaŭ estis pridiskutita.

Bojĉo Mladenov el Vraca dividis sian riĉan, preskaŭ dudekjaran sperton pri instruado de E-o en la lernejoj. Tre emociige kaj entuziasme li parolis pri sia malfacila, tamen interesa, sukcesplena kaj fruktodona laboro kiel gvidanto de la lernejana E-societo „Verda Raketo“.

Fine, per mallonga konkluda parolado k-do Valev sumigis la rezultojn de la farita laboro en tiu historia konferenco kaj k-do Bozarov, prezidanto de la konferenco, per varmaj bondeziroj por brilaj rezultoj de la instrulaboro fermis la konferencon.

Pri tiu unua metodika E-konferenco oni povas diri, ke ĝi estis vere fruktodona kaj rezultopromesa.

Fine ni devas danki al la iniciatintoj de la konferenco kaj tutkore deziri al la instruantoj grandan entuziasmon kaj bonajn rezultojn.

M. E.

EL LA PEDAGOGIA SPERTO

KANTADO HELPAS LA E-INSTRUADON

Komencante mian Esperanto-instruadon antaŭ 12 jaroj mi tute ne konsciis la rolon de la kantado kiel instru-helpilo. Mi gvidis la kurson en instruista stud-domo kaj mia grupo studis muzik-edukadon. Kompreneble, la ĝeneralaj kantis tre volonte kaj petis min pri esperantaj kanzonoj.

Baldaŭ E-kantado konsistigis sufiĉe grandan parton de ĉiu nia leciono. Tuj mi rimar-

kis, ke rapide plivastiĝas la vortprovizo de miaj ĝeneralantoj, ke ili parolas pli kuraĝe, pli flue.

De tiu tempo mi komencis atente ekzameni E-kantadon laŭ ĝiaj instruvaloroj kaj konscie enkonduki ĝin en la lecionojn. Mi konkludis, ke kanzonoj povas servi jenajn celojn: 1) variigo de la leciono, 2) ripozo post mensostreĉo, 3) enkonduko de novaj vortoj, 4) fiksigo de gramatika materialo.

Por plenumi ĉi tiujn celojn mi preparas ĝeneralan planon en la komenco de ĉiu kurso. Mi elektas konvenajn kanzonojn (pripensante ilian alternon) konforme al lingvonivelo de la kursanoj, al iliaj aĝo, kantosento ktp. Krom tiu ĝenerala plano mi aplikas la kantadon dum ĉiu leciono laŭ jenaj reguloj:

1) Inter la unua kaj la dua partoj de la leciono oni kantu ne malpli ol 5 minutojn. Tio ĉi kontribuas al la ripozo kaj mensa refreŝigo. Tiucele mi ankaŭ proponas — de tempo al tempo — mallongan kantadon tuj post iu speciale laciga parto de la lernado.

2) La elektita kanzono koincidu kun la materialo de la leciono: ĝi povas firmigi la scion de la antaŭaj lecionoj aŭ enhavi la materialon, enkondukitan ĝuste antaŭ momento. Ekzemple ellerninte la sufikson „el“ kaj akuzativon de direkto, ĉiuj kantas „Knabineto arbareto“-n.

3) La elektita kanzono povas koincidi kun iu aktuala situacio kaj esti interesa pro sia aktualeco. Ekzemple, okaze de ies nomtago oni povas kanti „Vivu, vivu cent jarojn...“ Okaze de la naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof oni povas instrui la himnon „La Espero“, kompreneble nur al progresintoj.

4) Grava afero estas elekto de konvena tonalo por ĉiu kanzono. Plej taŭga estas mezalta skalo.

Se la grupo estas sufiĉe muzikema kaj multpersona, mi instigas ĉe al duvoĉa kantado. Pli talentaj personoj povas kanti kiel solistoj. Ekzemple en la kanzono „Knabineto arbareto“ la duan strofon kantas iu virino sola („Ĉasisteto, samvojano, mi salutas vin...“).

Se la grupo estas malpli muzikema mi enkondukas nur malmultajn kaj plej facilajn kanzonojn, sed mi variigas ilin per ŝanĝo de laŭteco, ekz. unufoje oni kantas refrenon laŭte, duafoje mallaŭte — aŭ per alterna kantado de la viroj kaj virinoj — ekzemple: „Verda estas, verda estas nia stelo“ kantas la viroj kaj „Homa amo, fratkompreno nia celo“ kantas la virinoj.

La kantado dum la lecionoj estas sendube tre valora, sed nur kondiĉe ke la instruisto mem estas muzikema (kantas aŭ ludas iun instrumenton) kaj antaŭ ĉio ke la grupo volas kanti. Se ne, oni devas rezigni pri tiu ĉi metodo. Tiukaze oni povas de tempo al tempo prezenti E-kantadon per diskoj aŭ magnetofonaj surbendigoj. Ne malofte okazos, ke ĝuste tio ĉi instigos al kantado.

EUGENIA SZCZYGLINSKA, Varsovio
(El „Pola Esperantisto“, 1—3/1981)

BIRGE TRERUP KAJ NIA FOLKLORARTO

Tuj post la folkloro festivalo en Koprivštica en Sofio okazis simpozio pri etnografio kaj folkloro. Ĝin partoprenis sciencistoj el 10 landoj. Inter ili estis ankaŭ nia samideanino s-ino Birge Trerup, docento pri etnomuzikologio ĉe la Instituto por muzika scienco en la Universitato en Kopenhago.

Sia intereso pri popola muziko naskiĝis dum junulara kongreso en FR Germanio en 1950, kiam ŝi aŭskultis horon kaj rigardis filmon pri tiu ĉi arto. En 1954/55 ŝi studis en Jugoslavio, kaj en 1956, dum la UK en Kopenhago, ŝi konatiĝis kun bulgara muzikologo prof. St. Guĝev, per kio ŝi realigis sian unuan kontakton kun la bulgara popola muziko. Sia komuna laboro kun prof. Guĝev pasis tra diversaj etapoj kaj daŭras plu. S-ino Trerup vizitis nian landon por unua fojo en 1961 por studi dum unu monato ĉe prof. Guĝev. Samtempe ŝi profitis la okazon aŭskulti popolan muzikon en diversaj partoj de la lando. Ŝi prezentis al mi grandan libron — rezulton de ŝia scienca esploro, eldonitan en Kopenhago, en angla lingvo: 23 kantoj el la regiono de Razlog. Birge Trerup tradukis la tekstojn de la kantoj en Esperanton kaj prof. Guĝev redaktis ilin. Sekvis dana kaj angla tradukoj. La resumo de la libro, skribita en rusa lingvo, estas traduko de prof. Guĝev el Esperanto.

Dum ŝia nuna vizito en Bulgario, en la pitoreska historia urbo Koprivštica, ŝia ĉiĉerono estis esperantistino. Nia gastino havis la okazon viziti ne nur la domojn-muzeojn, tamen ankaŭ ordinarnajn domojn kaj tiamaniere eksenti la atmosferon de la urbo.

Laŭ ŝiaj vortoj ŝi vere estis ravita de ĝia etoso kaj de la logantaro mem.

Nia gastino ne estas vizitinta multajn festivalojn. Sia celo estas vizitado de vilaĝoj en Bulgario kaj en aliaj landoj, kie ŝi laboras en vilaĝmedio. La diferenco? La festivalo estas impona revuo de diversaj stiloj, tamen mankas la originala medio. En la vilaĝo, kie la muziko naskiĝas kaj vivas, ĝi spegulas la kondiĉojn de vivo de la tuta regiono.

Por ŝia nuna gastado kaj scienca partopreno s-ino Trerup estas invitita flanko de la Komitato de Kulturo — Instituto pri amatora arto. Sub titolo „Pri la kompleksa karaktero de la instrumenta muziko en iu deeldiĝesta ceremonio“ ŝi prezentas siajn esplorojn, faritajn en iuj regionoj de Sud-okcidenta Bulgario. La prelego estis verkita en Esperanto, prof. Guĝev tradukis ĝin en bulgaran lingvon kaj s-ino Trerup traŝigis ĝin bulgarlingve!

— La plej grava akiraĵo de la simpozio por mi estas la personaj kontaktoj kaj interparoloj kun miaj kolegoj — asertas s-ino Trerup.

Dum ŝia restado en Sofio samideanino Trerup partoprenis kaj salutis la kunvenon de E-societo „Maksim Gorkij“, kies membroj ĉiam ĝojas la gastadon de eksterlandaj esperantistoj.

Ĝis revido, Birge Trerup! Forportu en via memoro la freŝecon de la balkanmontara aero kaj la plej kortuŝan el ĉiuj popolkantoj!

BELKA BELEVA



IVAN RILSKI — FILOZOFO KAJ PATRIOTO

Dum la regado de la bulgara caro Petăr (937—969) en Bulgario naskiĝis la bogomilismo — herezo, kiu donis novan klarigon al la deveno kaj la arango de l' mondo kaj kiu ekstaris kontraŭ la hipokritaj ekleziaj predikoj, servantaj kiel apogo de la reganta klaso. Multaj kredantoj ermitis, serĉante en la montaro rifuĝejon kontraŭ la arbitraĵoj de la regantoj, kaj spiritan apogon — en sia kredo je dio.

Inter la unuaj ermitoj estis Inan Rilski (876—946).

Li fugis en Rila-montaron, kie travivis tutajn 27 jarojn en plena soleco, strikte observante la faston...

... Li vivis meze de la naturo, „kiu kreis la homojn egalaj, por esti virtaj kaj bonfaraj, sed ne por avidi regpovon kaj vantecon“ — jen kion li instruis al la homoj.

La biografio de Ivan Rilski, verkita de nekonnata aŭtoro en la XII jc, estas saturita de la

propra al la mezepoka homo religia mistiko, kaj tamen en ĝi oni povas facile malkovri la racian kernon en la vivo kaj la faroj de la granda Ermito.

En la mezo de la X-a jc Ivan Rilski kaj liaj adeptoj fondis klerigan skolon, kiu laŭ sia karaktero estis esprimo de pasiva protesto kontraŭ la socia maljusteco, disvastiganta paralele kun la evoluo de la feŭdaj rilatoj. Ilia idealo estis la simpla, eĉ asketa vivmaniero de la ordinaraj kamparanoj, for de caroj kaj nobeloj. En tiu idealo trovis sian esprimon la klasa ideologio, klare dividanta „malriĉulojn“ de „riĉulojn“.

Kvankam la predikoj de Ivan Rilski tute ne enhavis ideon pri ribelo, fakto kondiĉata de la evoluo de la epoko mem, ili tamen alvokis al ŝanĝo de la ekzistanta realo surbaze de la denaska egaleco inter la homoj.

La faro de Ivan Rilski lasis profundajn spurojn — dum pluraj jarcentoj la kleriga skolo en Rila-montaro forte influis la spiritan vivon de la bulgaroj. Ĝia centro estigis la Rila-monaĥejo — unika monumento de konstrumajstrecio, lignoskulptado kaj ikonpentrado.

Dum la jaroj de la Otomana juko la Monaĥejo de Rila, en kiu estis konservataj la mortrestaĵoj de Ivan Rilski kaj kie estis respektataj la tradicioj de liaj adeptoj — popolaj klerigantoj, estis por la bulgaroj siaspeca gvidstelo en la mallumo de la sklaveco.

Doc. ST. PANĈEV



La Rila-monaĥejo

Festo de amikeco kaj beleco



(de p. II)

Kaj ni ĉiam gardos kaj memoros sian saĝan konsilon:

„Aspiru al la beleco en la vivo!“

Infanoj el la tuta mondo, karaj etaj amikoj, junaj kreantoj!

Tiu ĉi sincera alvoko de la beleco, de la aŭdaco kaj la lumo, de la celado al harmonio kaj perfekteco inspiru kaj unuigu nin, por ke ni ĉiuj kaj ankaŭ multaj aliaj junaj kreantoj denove kunvenu venontjare sub la sunplena ĉielo de Bulgario!

Bonvolu partopreni la Duan Asembleon „Standardo de la paco“ de 15-a ĝis 25-a de aŭgusto 1982!

La infanoj de Bulgario atendas vin!

Ili atendas vin kaj viajn kantojn, versojn, bildojn, viajn aŭdacajn revojn.

Ni denove etendu niajn manojn, milojn kaj milionojn da manoj el ĉiuj mondregionoj, el ĉiuj kontinentoj kaj ŝtatoj, ni denove interplektu niajn infanajn manojn kaj ili transformiĝu en vivan neston, el kiu elflugos la blanka kolombo de la paco, portanta sur siaj flugiloj nian devizon: „Unueco, Kreado, Beleco!“

RENKONTIĜO „SOFIO — 81“ DE LA ASEMBLEO „STANDARDO DE LA PACO“

La infanoj estas la espero kaj la estonteco de la homaro. De ilia eduko dependas la morgaŭa mondo. Guste tiu ĉi eterna temo pri la homo, pri la kondiĉoj kaj la vojoj de ties evoluo estis la unuiga impulso de la Internacia Infanasembleo „Standardo de la Paco“, okazigita en Sofio dum la Internacia Jaro de la Infano en 1979 laŭ iniciato de Popola Respubliko Bulgario. Inspirinto kaj organizinto de la Asembleo estis la inda filino de la bulgara popolo — la neforgesebla Ljudmila Jivkova.

Tiu ĉi rimarkinda iniciato gajnis la altan rekonon kaj pritakson de la plej aŭtoritataj internaciaj organizaĵoj kaj institucioj kaj nur en du jaroj ĝi transformiĝis en amasan naciajn kaj internaciajn movadon. La Asembleo „Standardo de la paco“ ne estas nur ideo. Ĝi estas ankaŭ konkreta ornamo kaj socia mekanismo; ĝi estas praktika realigo de la tuthomaraĵ idealoj.

Por popularigo kaj firmigo de la ideoj de la Asembleo en nia lando oni jam tradicie organizas ĉiujare reprezentantan renkontigon de infanoj el la tuta mondo. De la 15-a ĝis la 25-a de aŭgusto j. k. okazis la Renkontiĝo „Sofio—81“ de la Asembleo, la dua laŭvice. La renkontigon partoprenis infanoj el 97 landoj kaj el pliaj 2 landoj malĉeeste — per

siaj verkoj. Dekdu landoj por la unua fojo sendis siajn reprezentantojn. La eksterlandaj gastoj — infanoj, gepatroj kaj akompanantoj nombriis 390. Krom junaj muzikistoj, pentristoj kaj verkistoj la ĉi-jaran Renkontigon partoprenis por la unua fojo ankaŭ junaj sportistoj kaj teknikistoj.

Feliĉe la ĉi-jara Renkontiĝo koincidis kun la celebrado de la 13-jarcenta jubileo de la bulgara ŝtato, kio ebligis al la junaj senditoj de la paco kaj al iliaj akompanantoj konatiĝi kun neforgeseblaj paĝoj de la heroo pasinteco kaj de la hela estonteco de nia popolo. Riĉa kaj varia estis la programo de la renkontiĝo. Ĉirkaŭite de la varmaj zorgoj ne nur de la bulgaraj infanoj, sed ankaŭ de elstaraj reprezentantoj de niaj ŝtatoj, partiaj kaj kulturaj institucioj, la infanoj elmontris siajn plej bonajn atingojn en la kampo de literaturo, pentroarto, muziko, sciencia-teknika kreado kaj sporto. La multnombraj manifestaĵoj de la infanoj konfirmis la ideon, ke la ĉiufanka kaj harmonia spirita kaj korpa evoluo estas necesa kondiĉo por la perfekteco de la personeco. En la kadroj de la renkontiĝo „Sofio—81“ por la unua fojo estis organizitaj ekspozicio kaj revuo de la infana sciencia-teknika kreado, samkiel sportludoj. Tio plilargigis kaj pliriĉigis la amplekson de la Movado „Standardo de la paco“. Pliampleksigis la kreita en 1979 fonduso „Standardo de la Paco“ el artaj verkoj de infanoj el la tuta mondo (en 1979 estis registritaj 21 000 verkoj de la diversaj artoj — pentraĵoj, muzikaj komponaĵoj kaj literaturaj verkoj).

En la fino de la renkontiĝo la partoprenintoj akceptis Leteron-Alvokon al iliaj amikoj en la tuta mondo. Estis decidite okazigi en Sofio de 15-a ĝis 25-a de aŭgusto 1982 la Duan Internacia Infanasembleon „Standardo de la Paco“. Oni atendas, ke en Sofio kunvenos infanoj el preskaŭ ĉiuj landoj — po 10 infanoj. La komitatoj kaj la centroj „Standardo de la Paco“, kreitaj en multaj lokoj eksterlande, ekde nun planas efektiviĝi dum la venonta jaro aktivan preparan laboron — ili organizos revuojn, ekspoziciojn kaj konkursojn por elekti por partopreno en la Asembleo la plej bonajn verkojn, la plej talentajn infanojn. Oni antaŭvidas, ke al la Dua Asembleo estu invigitaj mondkonataj kreantoj kaj kulturaj agantoj, kiuj helpos por la popularigo de la Movado „Standardo de la Paco“.

La ideoj kaj la celoj de la Movado „Standardo de la Paco“ estas ege karaj al la bulgaraj e-istoj. Pro tio ili kun granda plezuro popularigas ĝin eksterlande. Ilin tamen agitas la problemoj pri utiligo de la Internacia Lingvo Esperanto en la asembleoj, ĉar ili estas konvinkitaj, ke E-to povas ludi eksterordinare gravan rolon por pli efika realigo de la celoj de la Movado „Standardo de la Paco“, precipe en la estigo de senperaj kontaktoj inter la diversaciaj infanoj.

Brilan sukceson al la Dua Internacia Infanasembleo „Standardo de la Paco“!

DIMITAR HAĜIEV,
prezidanto de la Bulgara MEM-Komitato



La belajoj de la Tero — por la estontaj generacioj!

filoj, ĉasekipaĵoj, fiŝkaptiloj, vestoj kaj akcesorajoj, kiujn produktis bulgaraj kaj eksterlandaj firmaoj. En la Halo de la Nacioj oni eksponis la plej interesajn kaj valorajn trofeojn el ĉiu lando. Estis videblaj du elefantaj dentoj el Zambio, pezantaj 87,5 kaj 87 kg, taŭra trofeo el Mozambiko, hipopotamo el Tanzanio k. a.

Gravan lokon en „Expo'81“ okupis Bulgario ne nur kiel lando-gastiganto, sed ankaŭ kiel lando kun bonorganizita ĉasmastrumo. En tri haloj oni eksponis pli ol 3000 trofeojn kaj aliajn elmontraĵojn. En unu el la plej grandaj kaj interesaj haloj, ĉe kondiĉoj, similaj al la naturaj, estis videblaj diversaj specoj de ĉasbestoj, samkiel ankaŭ aliaj naturaj riĉaĵoj.

Amplekse kaj kun granda atento al la naturo oni prezentis la ĉasadon en Sovetunio — proksimume 1300 trofeoj, el kiuj 728 ricevis oran medalon.

Hungario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Rumanio, Pollando, Jugoslavio, FRG, Britio, Aŭstrio, Kubo, la afrikaj landoj — ĉiu lando, reprezentita en „Expo'81“, elmontris interesajn.

La Monda Ĉasekspozicio estis altnivela kaj atentokapta renkonto kun la tutmonda faŭno, grandega zoologia muzeo.

E. GEORGIEV

La nuntempa Plovdiv estas moderna urbo kun vastaj parkoj kaj ĝardenoj; urbo, en kiu ĉiujare okazas internacia specimena foiro. En ties ekspozicia centro de la 14a de junio ĝis la 12a de julio okazis la Monda Ĉasekspozicio — „Expo'81“ sub la alta protektado de la prezidanto de la Stata Soveto de PR Bulgario Todor Jivkov.

Preskaŭ unu monaton en la antikva kaj juna Plovdiv regis la eterna strebo de l'homaro protekti kaj pliriĉigi la vivmedion, por ke la beleco de nia planedo konserviĝu por la estontaj generacioj. Reprezentantoj de 61 landoj klopodis prezenti la ĉasadon kaj la fiŝkaptadon en diversaj partoj de l'mondo, la atingitaĵojn kaj aparte la problemojn pri protektado de la naturmedio. Ne hazarde la devizo de la ekspozicio estis „Tero — planedo de l'vivo!“ Tio ja estas ankaŭ instigo...

En la ekspoziciejoj estis eksponitaj 12 000 ĉastrofeoj. Grandan intereson provokis pa-

UNUA ESPERANTOLOGIA SIMPOZIO EN BULGARIO

La 26-an kaj 27-an de septembro 1981 la Filologia sekcio de BEA organizis unikan laŭ sia karaktero aranĝon — Scienc-praktikan Esperantologian Simpozion.

Sidejo de la Simpozio estis la Sofia Universitato „Kliment Ĥridski“. Ĝian laboron partoprenis pli ol 40 esperantistoj-filologoj el la tuta lando.

Ĉe la Simpozio estis prezentitaj kvar bone motivitaj referaĵoj, nome:

— Striktigo kaj unueco de la terminaro kaj pri ĵur gramatikaj kategorioj — de Violin Oljanov.

— Amplekso de instruado de gramatiko en kursoj — de Kunčo Valev.

— Organizaj formoj kaj aranĝoj por suprenigo de la lingva nivelo de l' bulgaraj esperantistoj — de Marin Băceŭ.

— Formoj por organizita studado kaj diskutado de esperantologiaj kaj interlingvistikaj problemoj — de prof. d-ro Stojan Ĝuĝev.

La referaĵoj provokis viglajn kaj utilajn eldirojn. La unuan tagon la parolon prenis S. Hesapčiev, D. Haĝiev, B. Beleva, D. Dencev, As. Grigorov, N. Aleksiev, prof. Ĝuĝev, L. Marikin, St. Maserov, K. Valev, St. Damjanova, V. Cljanov kaj la duan tagon — St. Maserov, D. Haĝiev, N. Aleksiev, prof. Ĝuĝev, Iv. Liŝev, Ev. kaj Jordan Bojaĝiev, L. Satrirova, ing. P. Todorov, K. Valev, M. Elenov kaj N. Andrianova el Sovet-Unio.

Konekse kun la nova situacio, ekestinta post la enkonduko de Esperanto en la studplanon de la bulgaraj mezlernejoj kaj la akra bezono de alte kvalifikitaj instruistoj de Esperanto, la Simpozio pridiskutis diver-

sajn aranĝojn por altigo de la lingva nivelo, interalie restarigon de la Esperanto-Instituto de BEA kaj de la funkciado de la Sofia Filologia E-Grupo, agadon por enkonduko de Esperanto en la instruoplanon de universitatoj, pedagogiaj institutoj k. a., kiuj donas specialan kvalifikon de „instruisto“ kaj rajtigas instrui la Internacian Lingvon en mezlernejoj; agadon por kreo de katedro aŭ fakoj pri esperantologio kaj interlingvistiko de la Sofia Universitato, kie la dezirantoj povus akiri superan kleron kaj profesion-sciencan kvalifikon pri tiuj sciencoj; instigadon de studentoj-filologoj kaj lingvistoj, ke ili adoptu temon por kandidata aŭ doktora disertacio pri esperantologio de la Sofia Universitato ktp.

La Simpozio aprobis projekto-decidojn, plej gravaj el kiuj estas la fando de du laborgrupoj — pri Interlingvistiko, kun prezidanto prof. Stojan Ĉuĝev, kaj pri Esperantologio, kun prezidanto Violin Oljanov kaj la organizo de Kluboj de E-parolantoj (KEP) kaj kiel ties gvidorgano — kreo de Tutlanda klubo de E-parolantoj (TKEP).

Honora gasto de la Simpozio estis prof. Ivan Duri-danov — ĉefo de la Katedro de lingvoscienco de la Sofia Universitato.

Respondante al starigitaj al li demandoj, prof. Duri-danov esprimis la esperon, ke oni povus trakti la eblecon pri kreo de teoriaj kursoj de Esperanto en la Universitato (ekzemple pri „Metodiko de E-instruado“), pri elekto fare de studentoj de Esperanto kiel dua specialeco kaj eventuale — pri kreo de aspiranteco pri Interlingvistiko.

RAJNA KONSTANTINOVA

ESPERANTO KAJ MONDA TURISMO

DIMITAR KARASTOJANOV.

direktoro de „Internacia Kunlaborado“
ĉe la Ŝtata Komitato pri Turismo

Kvankam iom malfrue, ni disponigas lokon al tiu ĉi artikolo, ĉar ĝi konkrete rilatas al la problemoj pri enkonduko de E-o en diversajn sferojn de la ĉiutaga vivo.

La redakcio

La intereso de la bulgaraj esperantistoj al la laboro de la Konferenco de la Monda Organizaĵo pri Turismo en Manila (Filipinoj) estas tute natura kaj komprenebla. Ĉar kune kun la variaj rimedoj, kiujn oni aplikas por plua evoluo de la internacia turismo, oni jam turnas pli seriozan atenton al la problemoj pri la lingvaj barieroj kaj serĉas la plej taŭgan vojon por ilia forigo. La farita unua paŝo tiudirekte estas kuraĝiga: la orientiĝo al la Internacia Lingvo Esperanto estus fakto kun eksterordinara graveco.

En la laboro de la Konferenco okazis viglaj diskutoj pri la obstakloj, ligitaj kun la lingvaj barieroj. La hungara delegitaro proponis, ke oni pridiskutu la demandojn pri utiligo de Esperanto kiel lingvo de la turismo. Tiu propono estis renkontita pozitive fare de multaj delegacioj. Mi devas noti, ke nia delegitaro apogis la proponon.

Nia delegitaro subtenis kelkajn proponojn sur la kampo de l' turismo, inkluzive la ideon utiligi Esperanton kiel internacian lingvon en la turismo k. a. En la Deklaracio de Manilo estis speciale menciita la neceso „akceli la formigon de turista konscio por plifaciligo kaj kuraĝigo de la komunikado inter vizitantoj, loĝantoj de la vizitataj lokoj kaj turisma oficistaro“. En tiu direkto oni laboru pli organizite por lernado de fremdaj lingvoj, „precipe de tiuj kun universala destino, kiel Esperanto“. Tiurilate mi konsideras ankaŭ la aktivecon de la esperantistoj-turistoj.

Estas konate, ke la Komitato pri Turismo havas multjaran tradicion en la eldono de materialoj en Esperanto. Jam 10 jarojn oni disvastigas la E-bultenon „Bulgario — Turisma Informo“; en Esperanto estas sonigita la filmo „Bulgara Somero“. Oni preparas diapozitivojn pri turismaj objektoj en nia lando kun surskriboj en E-o, k. a.

Do Esperanto jam okupas indan lokon en la propaganda informala laboro en la sfero de Turismo en nia lando kaj en la tuta mondo.

INTERNACIAJ E-ARANĜOJ EN ŽILINA

Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko, en ĉiutaga vivo kaj turismo — jen la ĉefaj temoj de la ĉi-jaraj internaciaj E-aranĝoj en Žilina, ĈSSR.

Inter la 14a kaj 22a de aŭgusto 1981 frekventis ĉiam paralele du el la aranĝoj. Plej longdaŭra dum la tuta periodo estis la renkonto de E-familioj kun denaskaj e-istoj. Dekdu geknaboj inter 2 kaj 12 jarojn aĝaj kaj 18 gepatroj el diversaj landoj renkontiĝis en Žilina. La infanoj normale kunvivis — kvazaŭ samnaciaj, interamikiĝis, ludis kune, konkuris en pentro-arto, preparis programon de deklamoj, kantoj, scenetoj.

Tamen certe plej grava estis la unua internacia konferenco por „Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko — AEST“. Ĝi fakte funkciis kiel neesperantista aranĝo. Kolektiĝis proksimume 150 gefakuloj laborantaj en diversaj scienc-teknikaj kampoj (pluraj komisiitaj de la institucioj, en kies sistemoj ili laboras) el Aŭstrio, Anglio, Bulgario, GDR, Italio, Jugoslavio, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Japanio, USSR, Hungario, Rumanio.

En kelkaj sekcioj ili preparolis pli ol 50 sciencajn prelegojn kaj anoncojn, utiligante nur Esperanto kiel komunikilon. Estas neeble rakonti tie ĉi pri ĉio. Sed ĉiu, kiu interesiĝas, povus mendi ĉe la organizantoj la prelegvolumon.

La konferencon malfermis ing. Aleš Bednařík, sekretario de scienc-teknika sekcio ĉe Slovaka Esperanto-Asocio.

Intereson provokis en la koncernaj sekcioj ankaŭ la prelegoj de la bulgaroj ing. Bojidar Leonov kaj Petko Arnaudov: „Bazaj principoj de scienco kaj patent-teknika informado. Eblecoj por apliko de Esperanto“ kaj „Matematiko en ĝeneralaj amuzoj“.

Mencion indas ankaŭ la turismaj tagoj — TUTA — en Žilina. Ili komenciĝis tuj post la konferenco kun partopreno de novaj 145 personoj el 8 landoj. Estis vizititaj pluraj naturbelaj, kiel Vrátna valo, la kastelo en Bojnice kun la fama zooparko, rokaro de Sutov ruinburgo — Lietava, Klak, Sutovo, ruinburgo Hričov, k. a.

PETKO ARNAUDOV

PORTUGALA ESPERANTISTO — KONSTRUANTO DE KOSMAJ ŜIPMODELOJ

Samideano Joao Caeiro de Sousa el la portugala urbo Barreiro, fervoja teknikisto, konstruis miniaturan modelon de la sovetia kosma ŝipo „Vostok“, per kiu je la 12-a de aprilo 1961 startis en la spacon la unua kosmonaŭto Jurij Gagarin.

Por la celo de Sousa uzis diversajn materialojn: aluminon, korkon, feron, plaston k. a. Malgrandaj elektromotoroj kaj komplika sistemo de horloĝadoj, sinkronigitaj per programilo de lavmaŝino, movigas ne nur la modelon de la kosma ŝipo, sed ankaŭ la modelojn de la Tero, de la Luno kaj ties fazoj, la ŝanĝon de la diapozitivaj, prezentantaj pejzaĝojn de la luna surfaco, la kosman spacon kaj diversajn momentojn de la kosma flugo, inkluzive la alproksimiĝon de la direktataj kosmaj ŝipoj „Sojuz“ (Sovet-Unio) kaj „Appolo“ (Usono). La plena ciklo de la prezentaĵo daŭras 20 minutojn.

Ege interesa estas la etoso en la hejmo de Joao de Sousa, speciale en lia laboratorio: tie oni povas vidi diversajn librojn kaj teknikajn vortarojn, diskojn, diapozitivajn, magnetofonbendojn, sur kiuj estas registritaj voĉoj de sovetaj kaj usonaj kosmonaŭtoj, medalojn, emblemojn, albumojn kaj revuojn — eble ĉion, kio rilatas al kosmaj problemoj kaj kosmonaŭtiko.

Joao de Sousa informis nin, ke li komencis kolekti tiujn ĉi materialojn kaj okupi sin



pri konstruado de modeloj de kosmaj ŝipoj ekde 1957. Li regule sin informas pri la plej novaj eventoj kaj preparoj en la sfero de kosmonaŭtiko, kolektas novajn eldonaĵojn kaj dokumentojn pri kosmaj esploroj.

S-no de Sousa subtenas kontaktojn kun esperantistoj el Sovet-Unio, Bulgario, Francio, Italio, Nederlando, Hungario k. a., de kiuj li ricevas interesajn materialojn por sia kolekto. La pliparton de ĝi li ŝuldas al siaj sovetaj korespondantoj, interalie li posedas ankaŭ portreton de la sovetia kosmonaŭto German Titov kun dediĉo en Esperanto. Ĝis nun ni sciis, ke nur la patro de Titov scipovas Esperanton kaj nun pere de Joao de Sousa ni informiĝas, ke la rondeto de la kosmonaŭtoj-esperantistoj grandiĝas — unue Bertalan Farkaš el Hungario kaj nun ankaŭ German Titov! Ĉu baldaŭ la Kosmo ekparolos en Esperanto? Kial do ne?!



Caeiro de Sousa explica o funcionamento do «Vostok». Aqui está a Terra, girando, e a sua volta «spatniks» e «apolos»

Uma resistência vem depois a ser quebrada pela cauda. Finalmente, o ciclo completa-se com a vinda da quarta peça, que mostra a Terra e os seus movimentos e, de esp. redor, um «spatnik», um «Vostok» e a junção da nave americana com a nave soviética.

PRUVO PRI LA UNIVERSALA NEŬTRALECO KAJ INTERNACIECO DE ESPERANTO

Kleruloj, precipe la neparolantoj de E-o, kiuj agnoskas ĝiajn bonajn kvalitojn kaj avantaĝojn kompare al la naciaj lingvoj, uzataj kiel internaciaj, refutas tamen ĝian internaciecon. Ili argumentas, ke E-o estas kreita surbaze de la eŭropaj lingvoj, ĉar ĝia aŭtoro d-ro L. L. Zamenhof konis esence nur eŭropajn lingvojn. Tial ili konkludas, ke E-o povus servi kiel internacia lingvo eble nur por la eŭropaj popoloj, do ĝiaj pretendoj al neŭtraleco inter la lingvoj estas senbazaj.

Feliĉe ni jam havas tre konvinkan sciencan pruvon pri la efektiva neŭtraleco kaj internacieco de E-o. Tiam pruvon prezentas la studo de unu el niaj elstaraj lingvistoj Claude (Klod) Piron „Esperanto — ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?“

La pruvo pri plena neŭtraleco kaj internacieco de Esperanto estas bazita sur ĝia klasifiko en la larĝega gamo de la homaj lingvoj, kiun la aŭtoro faris, aplikante la metodon de kompara lingvistiko. La klasifikon li faris por respondi al la demando: ĉu Esperanto estas eŭropa aŭ azia lingvo? En la komenco mem de sia studo Piron prave refutas la esprimojn „eŭropa lingvo“ kaj „azia lingvo“ kiel nenion signifantajn, ĉar en Azio oni parolas multajn lingvojn, kiuj strukture kaj historie apartenas al la sama familio kiel la plimulto el la eŭropaj lingvoj (la t. n. hindeŭropa familio): i. a. la iranaj, bengalan, sinhalan, kaj en Eŭropo male, milionoj da homoj parolas lingvojn apartenantajn al kategorioj multe pli vaste reprezentataj ekstereŭrope, ekzemple la turkan, la finnan, la hungaran, la maltan.

Por klasifiki E-on al iu el la lingvaj kategorioj, la aŭtoro komparas ĝin kun la tri bazaj tipoj de lingvoj, en kiujn ĝenerale kaj tradicie oni dividas la lingvojn laŭ la tipologia (morfologia) klasifiko de la lingvoj:

a) fleksiaj — kiel la hindeŭropaj kaj similaj, en kiuj varias la formo de ĉiuspecaj morfemoj, inkluzive semantikajn, kiuj ne estas afiksoj;

b) aglutinaj — kiel la hungara kaj la turka, en kiuj varias nur la formo de la gramatikaj morfemoj kaj inter la semantemoj nur la afiksoj;

c) izolaj — kiel la ĉina kaj la vjetnama, en kiuj la formo de neniuj morfemoj varias. (Izolaj lingvoj ekzistas ankaŭ en Afriko kaj Ameriko. La t. n. kreolaj lingvoj same apartenas al la izolaj).

Lige kun tiu ĉi klasifiko de la lingvoj Claude Piron korekte rimarkigas, ke la tradiciaj kategorioj estas tro rigidaj kompare kun malfacile klaseblaj realaĵoj, kio evidentiĝas el tio, ke difinita trajto ofte retroviĝas en malsamaj lingvaj kategorioj aŭ familioj, ĉar ne ekzistas plene „puraj“ morfologiaj kategorioj.

Plue, li korekte indikas, ke estus neprave klasi la lingvon laŭ apartaj ĝiaj trajtoj kaj ke ne eblas klasi E-on sen distingi almenaŭ tri nivelojn, kiujn li nomas profundan, mezan kaj supran. Por difini, al kiu nivelo tiu aŭ alia lingva trajto apartenas, li uzas kiel kriterion la senton, kiun la lingvouzantoj ĝenerale havas pri la graveco de la ŝanĝo. Montrante la signifon de ĉiu el la tri niveloj, la aŭtoro hierarkiigas ilin jene:

1. **kerna (baza, funda, profunda) nivelo:** baza tipo de gramatiko kaj de derivado, t. e. la maniero, laŭ kiu indikiĝas la rilatoj inter la vortoj (ekzemple, kiu determinas kiun), la precizigoj pri tiu aŭ alia nuanco (ĉu estas unu, ĉu estas pluraj; ĉu estas finite, ĉu plu daŭras ktp.) kaj la rilatoj inter la konceptoj (ekzemple inter frato kaj fratino, inter vidi kaj nevidebla, inter haroj, stari kaj harstariga);

2. **meza nivelo:** sintakso kaj vortordo;

3. **supra aŭ supraja nivelo:** efektiva formo de la vortoj, sonsistemo.

Komparante Esperanton kun lingvoj apartenantaj al la tri bazaj lingvaj kategorioj ĉe tiuj ĉi tri niveloj, la aŭtoro venas al la konkludo, ke ĉe la funda, kerna nivelo Esperanto estas izola lingvo, en iuj rilatoj (ekzemple la memstareco de ĉiuj morfemoj) eĉ pli izola ol la ĉina, ĉe la meza nivelo — nekontesteble slava kaj ĉe la supraja nivelo (la origino de la radikoj) — latinida-germana, precipe latinida lingvo. Per multaj trajtoj Esperanto similas la aglutinajn lingvojn. Ĉe la komparo de Esperanto kun diversaj tipoj de lingvoj la aŭtoro montras ne nur la similaĵojn, sed ankaŭ la malsimilaĵojn, kiuj malproksimigas ĝin de difinita lingva kategorio kaj alproksimigas ĝin al alia lingva kategorio. Ĉe la meza nivelo li donas ekzemplojn pri trajtoj komunaj al la latinida-germana kaj slava grupoj. La klasifiko de Esperanto kiel funde uzola lingvo estas malkovraĵo, ĉar antaŭe Esperanto estis klasifikata ĝenerale kiel aglutina lingvo.

La klasifiko de Esperanto laŭ la metodo aplikita de Claude Piron havas grandan sciencon valoron, ĉar ĝi tre konvinke pravas la universalan neŭtralecon kaj internaciecon de Esperanto. La detala analizo de la strukturo kaj la trajtoj de Esperanto kompare al la strukturo kaj la trajtoj de lingvoj de la tri bazaj lingvaj kategorioj montras, ke iurilate Esperanto estas tute hejma al la parolantoj de lingvoj, apartenantaj al difinita lingva grupo, kaj alirilite — tute fremda por la samaj parolantoj.

En la konkludo de la studo la aŭtoro rezonas pri tio, kiel Zamenhof, kiu regis nur fleksiajn lingvojn, kreis tian tipon de lingvo. Li hipotezas, ke Zamenhof probable volis krei tre koheran kodon, kaj la nevariado de la morfemoj verŝajne estas ŝuldata precepto al tiu deziro, ne al la intenco sekvi kreolajn aŭ ĉinan modelon. Li ne ekskludas tamen la hipotezon, ke Zamenhof estis influita de la konstato, ke en la tipa interkultura situacio, kiam du personoj konas nur kelkajn bazajn elementojn el komuna lingvo kaj povas komuniki, ili spontane trans-

formas tiun malbone konatan lingvon en speco de izola lingvo. Laŭ mi tiu ĉi hipotezo estas tute ebla, se oni konsideras la personajn spertojn de Zamenhof dum lia infanaĝo, pasigita en la kondiĉoj de multlingveco en Bjalistoko. Plue la aŭtoro montras la influon de la konsisto de la parolantoj de Esperanto sur la lingvan strukturon. La diverstipaj parolantoj rezultigas disajn tendencojn, kiuj streĉas la lingvon. En la vortaro oni observas streĉigon inter „naturalisma tendenco kaj „esperantista simpleco“, t.e. inklino uzi mallongajn radikojn kaj ekspluati la eblecojn rilatajn al derivado kaj kunmetado prefere ol enkonduki neologismojn. En la gramatiko la streĉigo estas inter „konservemo“ kaj „aŭdaco“, t.e. emo ĝisfunde ekspluati la tentadojn de la lingvo. En tiuj streĉigoj grandparte radikas la vivanteco de Esperanto.

La studo de Claude Piron havas ankaŭ alian valoron: ĝi instigas aliajn kompetentulojn eniri tiun esence gravan sciencon terenon.

Dimităr HAŬIEV

TRA SOVETIO

KRASNOJARSK. En novembro 1975 la Urba Komitato de Komsomo konfirmis oficiale la fondon de la Junulara E-klubo en Krasnojarsk. Ekfunkciis E-kursoj, ekbrulis unuaj diskutoj pri vojoj kaj perspektivoj de la klubevoluo. Tiel komenciĝis interesa kaj diversflanka vivo de la nova E-Klubo.

La Krasnojarska E-Klubo kunlaboras aktive kun la regiona kaj urba komsomolaj komitatoj, Urba kulturpalaco, kun aliaj sociaj kaj ŝtataj organizadoj. La ĉefa klubagado estas ĉiam direktita al vastaj laborulaj amasoj. Niaj programoj „Esperanto“ kaj „Horizonto“ antaŭvidas ne malpli ol 2 aranĝoj ĉiumonate, prelegojn en laboristaj komunloĝejoj, artikolojn en la regiona gazetararo, afiŝojn, flugfoliojn k. a.

Nun la klubo havas pli ol 150 membrojn kaj 200 korespondajn membrojn el 84 loĝlokoj. Multaj el ili partoprenas regule en regionaj kaj landaj E-aranĝoj.

NIJNEVARTOVSK. En du urbaj kulturdomoj estis organizita ampleksa ekspozicio dediĉe al la pachtato kaj al la 1300-jariĝo de Bulgario. Ĝin okazigis la loka E-klubo. Sur 12 grandaj tabuloj estis eksponitaj pli ol 200 afiŝoj, fotoj, libroj, insignoj k. a. materialoj. En du semajnoj la ekspozicion vizitis pli ol 10 000 urbanoj.

Ni tre dankas al la e-istoj el Sofio, Drjaŝovo, Polski Trameŝ, Gabrovo k. a. pro la kontribuoj por la ekspozicio.

SAMARKAND. Laŭ iniciato de Samarkanda E-Klubo kaj la regiona filio de Uzbeka Asocio de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Fremdaj Landoj estis aranĝita granda ekspozicio sub la nomo: „Bildoj el la vivo de Popola Respubliko Bulgario“. Ĝi ekfunkciis je la 13a de majo en la centra biblioteko „A. S. Puŝkin“.

Multnombraj materialoj de la ekspozicio (afiŝoj, fotoj, bildkartoj, libroj, revuoj, poŝtmarkoj, memoraĵoj ktp.) temas pri la historio, kulturo, bel-literaturo, arto, vivmaniero, moroj kaj kutimoj de la bulgara popolo, pri la nobla agado de la bulgaraj e-istoj, pri la nerompebla frata sovetia-bulgara amikeco.

La ekspozicio realiĝis dank' al la aktiva kontribuado flanke de multaj bulgaraj e-istoj kaj aparte de la membroj de E-societo „Hristo Kozlev“ el u. Polski Trameŝ.

SOVETIAJ FILMISTOJ EN BULGARIO

La Leningrada Studio por dokumentaj filmoj daŭrigas la filmadon de „La domo sur Talka“ (provizora titolo — „Ni ne kapitulacas, ni iras“). La filmo rakontas pri la infana internulejo en urbo Ivanovo, kie en la tridekaj-kvardekaj jaroj estis edukataj infanoj de eksterlandaj politikaj agantoj, infanoj de kontraŭfaŝistoj.

La produktado de tiu filmo estas esprimo kaj pruvo pri la internacia solidareco de sovetiaj filmistoj.

Antaŭ nelonge nia filma grupo (reĝisoro — Miĥail Litvjakov, kameristo — Juriĵ Nikolajev, son-teknikisto — Vladimir Ĉepov) vizitis Bulgarijon, kie estis filmitaj kelkaj epizodoj de la filmo. Unu el la edukitoj de la internulejo en Ivanovo — bulgaro Cavidar Dragojĉev, hodiaŭ estas eminenta kuracisto — specialisto pri kor-angia kirurgio.

La pluan filmadon oni daŭrigos en Sovet-Unio (Moskvo, Leningrado, Ivanovo), GDR, Hispanio kaj en aliaj landoj.

INNA SIMOJANOVA,
direktoro de la filmo

EN NIAN RONDON VENU, KAMARAD'!

EN NIAN RONDON VENU, KAMARAD'

Teksto de Vladimiro PACJURKO
Muziko de Vira VASAHAN'

Marciale

Es-pe-ran-to la lin-gvo ma-gi-a Al-pa-ro-lasla ho-mojn del' ter'

Es-tu mon-do la rond'fa-mi-li-a, Vi-vu ĉi-uj en paĉ' kaj prosper' En

ni-an rondon VENU ka-ma-rad' En ni-a ron-do ĉi-u es-tu frat' Pli

firme so-nu ĉi-e ni-a kant' Pri l'a-mi-kec', pri Es-pe-rant'.

Esperanto, la lingvo magla.
Alparolas la homojn de l' ter';
„Estu mondo la rond' familia,
Vivu ĉiuj en pac' kaj prosper'.

Refreno: En nian rondon venu, kamarad',
En nia rondo ĉiuj estu frat'.
Pli firme sonu ĉie nia kant'
Pri l' amikec', pri Esperant'! (dufoje)

Ne iligi por ĉiam militojn —
Tion celu komuna agad'.
Por ĉi-lukto sen ajnaj hezitoj
Conu maron al ni, kamarad'!

Nin ne ĝeros la haŭtoko'oro.
Nek distancoj malhelpos al ni.
Ni rondkantos kun pl'na fervoro,
Alvokante al vivharmonio.

Gajninta II premion en la konkurso „Muzo“
en urbo Vilnius — Litovio SSR.

DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

Medicinista E-kurso — kun la tuta mondo. Komuna
adreso: Rajna Kasabova, str. „Kiril i Metodi“ 84,
Ŝumen, Bulgario.

E-kurso de gimnazianoj — dez. kor. tutmonde. Ad-
reso de la instruistino: Rajna Kasabova, str. „Kiril i
Metodi“ 84, Ŝumen, Bulgario.

Fino Jolanta Dobрева, Sofia 26, str. Jakubica 21 —
kun ĉi pri ĉi.

Stefan Ivanov, lernanto, Loveĉ, str. „St. Karaĝa“ 15,
Bulgario — kun ĉi.

Nikolaj Petkov, vilaĝo Goran, distrikto de Loveĉ,
Bulgario — kun ĉi.

Margarita Vasilëva, vilaĝo Umarevci, distrikto de
Loveĉ, Bulgario — kun ĉi.

KOLOMBO

Antonio Trujillo, studento 24-jara. Apartato a'reo
47646, Bogota 1, Colombia — dez. kor. kun geamikoj el
Bulgario pri ĉi kaj interŝ. bildkartoj, memorajojn
k.t.p.

HISPANIO

Du fratoj, s-ro Francisco Javier Moleon (16-jara)
kaj s-ro Argel Moleon (28-jara) — dez. kor. kun bul-
garaj samaguloj. Interŝ. bildkartoj, esperantaj re-
vuojn kaj memorajojn. Adreso: Calle Argentina n-ro 2,
1o 2 Madrid 27 — Hispanio.

PARANGALICA

PARANGALICA — REZERVEJO DE NATURRICAĴOJ

Parangalica estas vorto grekdevena kaj signifas „malpermesite“. Turka bejo posedis tiun ĉi arbaron, kiun donacis al li la sultano mem. La bejo ne permesis al iu ajn enpaŝi en lian posedaĵon, precipe al arbohakistoj kaj al ŝafistoj.

La specialistoj difinas la mezaĝon de la arboj en la rezervejo „Parangalica“ (piceoj, abioj, pinoj kaj iuj specoj da fagoj) je 250–300 jaroj, kaj al iuj gigantaj arboj — je 370 jaroj. Multnombraj kaj diversaj estas la ĉasbestoj en la rezervejo. Ursoj, lupoj, kapreoloj kaj aproj loĝas en la arbaro; agloj, ŝvebas super la suproj, kaj urogaloj enloĝas la valojn.

La rezervejo troviĝas je alteco inter 1460 kaj 2500 m super la marnivelo kaj similas egallateran triangulon, kies ĉiu latero estas 5 km longa. Ĝi okupas areon de 1488 ha, de kiuj 349 estas forstumitaj, kaj la cetera parto estas altmontara zono. En 1932 la arbaro estis proklamita kiel ŝtata posedaĵo kaj ekde tiam ĝis nun ĝiaj trunkviloj kaj idilioj estis rompitaj nur foje, kiam en 1963 potenca ciklono elradikigis mallargan strion da arboj, kiuj iom post iom restarigis.

La urba aŭtobuso kondukis min 25 km oriente de Blagoevgrad, en Okcidenta Rila-montaro, supren laŭ la fluo de rivero Bistrica, ĝis la loko „Bodrost“, kie situas ripozloko. Marŝo ankoraŭ 5 km, kaj vi veros al la loko Kartalska Poljana. Pasintjare tie estis konstruita scienca centro por observado kaj esplorado en la rezervejo. En kvar objektoj estas instalitaj ilaroj, per kiuj scienclaboristoj faras trifojn en la tago kalkulojn. Tri lignaj pontoj trapasas la riverojn Bistrica kaj Hajduška, lamaj per siaj kristale puraj akvoj. Tie ĉi estas malvarmete, ĉar la centjaraj arboj fetas densan ombron. Mallarga vojo deflanĝas kaj kondukas al la unua objekto je 1460 m alteco, kie oni registras la temperaturon de la aero, la sunradiadon, la pluvkvanton, la malsekecon, kiel ankaŭ la gradon de penetrado de la humido al la kronoj kaj al la radikoj de la arboj. La vojo al la alia objekto estas kruta kaj mi anhelas, sed la silento kaj la 40–50 m altaj arboj, inter kiuj mi marŝas, denove revenigas miajn fortojn. La objekto situas sur la sama loko, kie pasis la ciklono. Iuj arboj estas falintaj teren, aliaj staras, sed sekigintaj. Tie



ĉi estas instalita heliografo — spegula sfero por mezurado de la suna intenseco. Mi denove venas al la vojdeflanĝo, de kie mi denove marŝas supren laŭ la fluo de rivero Hajduška kaj atingas ĝis la historia arbo. Grandega piceo vidiĝas dekstre. En unu el la dokumentoj pri Parangalica estas notite, ke tiu ĉi arbo estas la plej alta en Bulgario, alta 56 m kaj aĝa 370 jarojn.

Dum mia promenado mi renkontis tri ŝovetajn specialistojn. Mi interparolis kun Vasilij Volkov, hidrologo el la Instituto pri arbaroj en Moskvo. „Tiu ĉi rezervejo estas unika“, diris li, „ĉe ni ankaŭ estas tiaj arbaroj sur malgrandaj terenoj en Norda Kaŭkazo kaj en la Malproksima Oriento. La esplora laboro en Parangalica estas je monda nivelo kaj ĝi ne estas memcelo. Pere de ĝi ni vidas kiel oni devas flegi kaj konservi tiujn specojn da arbaroj, por ke oni ricevu maksimumon da tiuj produktoj, kiuj estas vivnecesaj kiel por la grundo, tiel ankaŭ por la homoj.“

Marin Băcevi

Redakta komitato:

Dončo ĤITROV (ĉefredaktoro), Marin BĂCEV, Vasil BOROVANSKI, Pof. Vasil ĈOĈOV, Dimităr ĤAĤIEV, Krăstju KARUCIN, Ĥaim LEVI (vicĉefredaktoro), Flori N:KOLOV, Lidia RAEVA.

Administranto: Kalinka VASILEVA

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordono „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6100.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97,
1303, Sofio, Bulgario

P. K. 66
1000 Sofio

tel. 32-40-68, 31-00-29